# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 27/10/2022 Sescentsesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 681,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **153,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON

KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

NECESAS ALTNIVELA LINGVOUZO

24-a de oktobro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*



# Skribu pri via klubo






(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

**EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ DE LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).** **N.ro 9 de "Por Komencantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ**: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La normala vortspeco de la kernvorto de gramatikaj subjekto kaj objekto estas substantivo (aŭ infinitivo). De kiu vortspeco estas la kernvorto de la sekvantaj subjekto kaj objekto en "Kiom da pomoj estas en la ŝranko?" kaj "Ni manĝis hieraŭ multe da pomoj."

2). Ĉu la predikato povas manki en frazo?

3). De kiuj frazpartoj la infinitivo povas esti kernvorto?


Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 606. *Marcel Leereveld.*

## Kia ĝojo !


Kvankam plejparto de la legomoj kaj fruktoj, kiun mi konsumas, kreskas en nia ĝardeno, mi kutime ne zorgas pri ilia kreskado. Mia rolo estas simple rikolti, konservi , kuiri. Mi trovas tro malfacile eligi la plantetojn de la pledo kie ili ĝermas por translokigi ilin al la fekunda grundo de la ĝardeno. Sed pasintjare amiko proponis al mi tomato-plantetojn , kiujn li kreskigis en kartona tubo de neceseja papero, tiel ke oni simple enmetas en la teron la tuton kaj evitas tiun delikatan operacion.



Mi decidis provi. Mi sekigis semojn de tomato sur papera tuko kaj fine de septembro mi tondis la paperan tukon por enmeti pecetojn en diversajn tubojn de neceseja papero. Mi senmanke akvumis ilin ĉiun tagon kaj atendis la miraklon. Mia kunulo, sperta ĝardenisto, anoncis ke post dek tagoj io devas aperi. Pasis la dek tagoj, eĉ dudek tagoj . Mi malesperis kaj esti preta ĵeti la tuton kaj atendi venontjare por ree provi- mi ne povas facile rezigni- kiam mi finfine rimarkis verdaĵon en du tuboj . Hurra! Mi sukcesis. Nun mi atendos ĝis la apero kaj maturiĝo de la tomatoj kaj mi certas ke mi neniam gustumis tomatojn tiom bongustaj kiom tiuj estos. Ĉu vi travivis similan sperton? *Franciska Toubole*



Ĉu WW3 estis planita?



2022.10.24 WHY I THINK THIS IS AN AMERICAN PLAN

https://www.greanvillepost.com/2022/10/25/why-i-think-this-is-an-american-plan/

Gonzalo Lira

**Jes! Nekredeble! Imagu!**

## Eĉ esperantistoj geedziĝas.



Sabate, la 15-an de oktobro Steven LANDMANN kaj Lillian "ligis la nodon" en Kanbero.
Ili ankoraŭ akceptas gratulmesaĝojn kaj bondezirojn.

*Sandor Horvath*



Steven kaj Lillian



Giles kaj Caitlin helpis la edziĝanton





Ĉiun matenon viro preterpasis domon. Tra la fenestro li povis vidi, ke virino per franca pano batas la kapon de sia edzo. Iun tagon li vidis, ke ŝi anstataŭ per franca pano batas lian kapon per fruktokuko.

La viro fariĝis iom scivolema kaj frapis je la pordo. "Ĉu vi ne kutimas frapi la kapon de via edzo per franca pano? Li demandis la virinon, kiam tiu malfermis la pordon.

"Jes," ŝi respondis, "sed bonvolu bone kompreni ke hodiaŭ estas lia naskiĝtago!"

*Bob Felby*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



1). Adverbo.
2). Ne.
3). De la subjekto kaj de la objekto.

*Marcel Leereveld*.



**3ZZZ** ... Pasintan lundon, la 24an de oktobro 2022 vizitis la studion Charles Stevenson el Adelajdo. Li informis pri la libro , kiun li preskaŭ finpretis kune kun Katja Steele pri la aŭstraliaj esperantistoj, tiel ke la posteŭloj ne forgesu ilin . Li parolis ankaŭ pri kelkaj eminentaj esperantistoj de la fruaj jaroj.



Estas preskaŭ la fino de la monato , do la fino de la tiujara radiotono . Se vi ankoraŭ ne donacis monon kaj deziras tion fari, bonvolu turni vin al Heather erikino48@gmail.com aŭ telefone 0419 895 934



La teamo dankas la donacintojn kaj donacontojn *Franciska Toubale*